

Agado de la asocio Esperanto-Nancy 54

Partopreno en la Festo de la eùropa monato 2009

Sabate la 9an de majo, dum la manifestacioj organizitaj de la nancia Urbo, pri la eùropa monato, la asocio Esperanto-Nancy 54 budis sur placo Maginot, de la 9^a ĝis la 18^a, laŭ la temo "Une langue équitable pour communiquer".

Paneloj informis pri :

- la lingvoj en la eùropaj instancoj (la diversaj eùropaj instancoj, la oficialaj lingvoj en Eùropa Unio, la lingvaj leĝaroj kaj iliaj aplikadoj, la lingvaj servoj : interpreto kaj tradukado, Esperanto en la eùropa parlamento)
- la lingvoj en la lernejoj (la instruado de alilandaj lingvoj, la diverseco de la instruataj lingvoj en UE, la instruado de lingvoj, kiel publika politiko aŭ raporto GRIN, evoluado de la lernado de alilandaj lingvoj, karakteristikoj de esperanto, justa lingvo)
- la lingvoj en la ĉiutaga vivo de la eùropanoj (la oficialaj lingvoj de la eùropaj landoj, lingvoj kaj ekonomia vivo, lingvoj kaj amasinformilo, lingvoj kaj interreto, renkontoj kaj vojaĝoj per esperanto)

Ludoj estis proponitaj al la multaj pasantoj, el kiuj iom da haltis. Puzloj pri bestnomoj tradukitaj en la kvar lingvoj de la landoj, fondintaj Eùropon kaj en esperanto, montris la simplecon de la esperanta terminaro.

Flugfolioj diskoniĝis kaj interesaj diskutadoj okazis kun pasantoj, kelkaj malfavoraj, sed multaj akceptemaj al la ideo de ĵusta lingvo.

Al **demandareto**, kopiita de tiu kiun realigilis la norda federacio, la haltantoj tiel respondis al la tri demandoj :

- Unua demando : Ĉi vi scias kio estas esperanto? jes 35, ne 7

- Dua demando : Kiel vi aŭdis pri ĝi?

-Familio aŭ amikoj : 11

-Amasinformiloj : 9

-Aliaj : 15

- Tria demando : Ĉu vi opinias, ke la UE devus konigi esperanton? Jes 26, Ne 4, Hezitema 6, Sen opinio 6

Ĵurnalisto de Radio Jéricho faris **intervjuon** dum ĉirkaŭ 15 minutoj.

Ĉirkaŭ la 10^a, Sinjorino Denry (servo de la internaciaj rilatoj) kaj Sinjoro Berlémont (vicurbestro, delegito al la eùropaj, internaciaj kaj translimaj rilatoj) vizitis nian budon.

Partopreno en kvartala festo

En Vandoeuvre, sabate la 16an de majo, ni partoprenis kvartalan feston "Récéanim", organizitan de la junuldomo "Nomade".

La infanoj devis viziti ĉiujn budojn por ludi kaj gajni multe da poentoj. Ni prezentis kartludon kaj puzlojn pri la lingvoj.

Helpe de esperanto, la infanoj, komplezure reordigis ŝajarojn kaj bovarojn en franca, germana, itala kaj nederlanda lingvoj. Kelkaj ludis plurfoje, por malkovri ĉiujn ludojn.

Ĉiuj pasis agrablan posttagmezon.